

Espéranto-Angulo

LERNEJA STRIKO EN GERMANA
SAAR-LIMREGIONO

Jus ĉe saarlana limo, tie kie unuaj montoj levigas ĉielen, estas situata vilaĝeto Uberlosheim ; estis jam ĉiam unu el la plej malriĉaj vilaĝoj de la Hunsrück-montaro. Ĝiaj enloĝantoj devis sin nutradi per penada laboro de korbplektiĝo. Malsato estis gasto en ĉiuj kabanoj. Nombro de enloĝantoj devis, enkovritaj en friponoj, travagadi la landon kaj sin nutradi per almozpeto.

Hitler akiris potencon. Ankaŭ la enloĝantoj de Uberlosheim ekaŭdis kaj donis al cirkaŭvagantaj Hiller-agentoj, iliajn kredemajn orelojn. La okuloj lumis ĝoje, nun mizera estos forigota.

Milionoĵ estis trompitaĵ kaj la espero je pliboniĝo estis anstataŭita per obslina rezisto. La Weimara respubliko kaj registaraj instancoj ne zorgis pri iliaj deziroj, « nacia registaro » ne ŝanĝis tion. Kontraŭe ! oni malpermesis al ili, la malsatantoj, ĉe la almozpeton. Infanoj kuris en lernejon kun ĉifonitaj vestoj kaj ŝuoj, kaj malsata stomako. En rajtigita indigno pri demagogio de Hitler kaj kompanio, enloĝantoj postulis, ke oni minimume liveru al infanoj ŝuojn kaj vestaron, kaj donu en lernejo manĝaĵon. Kion faris la naci-socialista administracio? Ĝi faris la saman, kion faris la alia administracio, ĝi ne prizorgis la postulojn kaj ne respondis. Sed tiam okazis io, kion naci-socialista administracio ne atendis, kaj kio pruvas, ke konfido al nacistoj ne nur estas ŝancelinta, sed tute malaperinta : ĉiuj infanoj ne venis en la lernejon. Lerneja striko, kiu estas 100 %-a, jam daŭras longtempe. La administracio estis konfuza. Ĉiam direktis al pli altaj instancoj. Agado de « Uberlosheimanoj » ekigis granda diskuton en multaj vilaĝoj. Ĉiuj laboristoj kaj kampuloj konsentas ilin.

Ĉiuj laboristoj kaj kampuloj konsentas ilin. En ĉiuj vilaĝoj kreskas indigno kontraŭ la regantoj de la

tria regno. Brunĉemizaj taĉmentoĵ jam ribelas en Hunsrück.

Ankoraŭ tio estas subieraj ribeloj. Sed ĉi faro de bravaj Uberlosheimanoj estas sendubaj signoj, ke ne nur restas ribelaj paroloj, sed la ega indigno kontraŭ trompo de la ŝancelario ŝanĝiĝas en aktivan batalon. Nature silentas pri tio la faŝista registaro. Ĝi ne skribas pri tio, ke en la limurbojn de Saarlando venas malsatantoj el Hunsrück por kapti hundojn por sin nutri ! Eble prosperas naci-socialistaj bonzoj subpremi strikon per teroraĵ aŭ mensogaĵ promesoj. Sed ne prosperas al ili, forigi indignon kaj mal saton de la popolo de Hubrück-montaro.

EN LA BULGARAJ LERNEJOJ

Nek unu momenton ĉesis protestoj en la gazetaro, kontraŭ la politiko de obskurantismo, kian la bulgara registaro faras. La problemo pri la taksoj estas en la centuro de bataloj. En sia bazo ĝi havas klasan karakteron. Por havi pli precizajn kaj senperajn informojn pri la kaŭzoj naskantaj la indignon kaj protesti-ondon inter lernantoj, mi turnis min al lernantino de gimnazio kiu rakontis jenon :

En sia plimulto, gelernantoj en ĉiuj lernejoj estas filoj de proletfamilioj. Pro plialtigo de la taksoj ĉijare multaj ne povis daŭrigi la lernadon. Aliaj kiuj pagis nur parton de ĝi estas avertitaj finpaci. En mala okazo sekvas eksigo. Krom ĉi takso (1560 levoj) ĉi lernanto ĉijare, laŭ arango de la ministri devas krom pagi 10 lev. por asekuras. En ĉi momento de furiozanta ekonomia krizo, kiam multaj apenaŭ povas akiri la sekan panpecon, venas ankoraŭ pli nova ŝarĝo. Ne ĉiuj pagas ĝin. Lakeajindividoj, instruistoj faŝistoj en siaj klopodoj plenumi ordonojn de siaj mastroj, permesas al si brutecan konduton al la infanoj en la kolekti-procedo de ĉi asekursumoj. Pli alta instanco prisilentis la faktojn kaj ne sankciis la subulojn. Kion do ? Ĉi eblas esperi kontraŭon ? Nur en proleta socialista sociordo, infanoj ricevos eblecon studi l'bere kaj senzorge en lernejoj sovettipaj. Nun balato necesas !

(La informojn ni eltiris de « Torè de l'Edukistoj »).